ISNN 0949-9830

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA
kaj de PATRONA ASOCIO "LEXICON SILVESTRE" R.A.

Nr. 57 Eberswalde, 2009 – 11 –15

(Esperanta versio - el la germana esperantigis Ingward Ullrich)

## Novaj vojoj

Tiu, kiu atente observas la evoluadon ene de nia Asocio, ĉiam kaj ĉiam pli klare rimarkos la novan vojon, kiun konsekvente ni estas paŝantaj ekde unu jaro. Ni iniciatis pliajn aktivecojn, post kiam la juraj bazoj de nia asocia aktiveco estis aktualigitaj. En ĉi tiu procedo la nova Homepage[1] (www.lexicon-silvestre.de) jam fariĝis grava fundamento de interkomunikado. Ĉi tie niaj gemembroj konstante povas sin informi pri la aktuala progreso de nia laboro. Eblas, ke ili ĉiutempe povas interkomuniĝi kun la honorofice agemaj gekunlaborantoj. Niaflanka virtuala buroo, enkonduko de Online-Banking kaj ne laste la utiligo de *i*Google (vd. FI Nr. 56) pliefektivigu nian agadon kaj progresigu la memadministradon.

Sekvanta tre grava paŝo koncernas nian terminologian laboron. Je la 7a de julio 2009, kadre de pliana (pligrandigita) kunsido de la direkcia konsilio, ni kune faris analizon pri la temo **"Databanko Lexicon silvestre – resumo kaj aktuala stato"**. Dum tiu kunsido evidentiĝis al ni, kiom senracia kaj krome temporaba kaj ege labornecesiga estis la agmaniero ĉe la strukturado kaj la traktado de la Paradox-Databanko. Ekde 1992 – do dum pli ol 15 jaroj – permane estis enigataj (storataj) senbezone parte la samajn dataojn en la DEF- kaj TES-datenarojn. Tio kaŭzis ekeston de multnombra datenaro, kies enhavo kaj aktualeco iom post iom fariĝis pli kaj pli nesuperrigardebla. Sed estintus sufiĉe, flegi la DEF-dataon kaj en kazo de bezono krei la TES-dataon el la DEF-datenaro per simplaj programrutinoj. La TES-datenaro necesis por la kreado de kapvortregistro (indeks-parto). La flegado de nia databanko per la ofte alternaj kunlaborantoj – pleje ne disponintaj pri antaŭkonoj rilate la laboron kun la Paradox-databanko – pruvis sin treege malfacila, ĉar la enigo de dataoj ne baziĝis sur paradox-sendependaj enigŝablonoj. Tio kaŭzis gravan tempoperdon kaj sekve de tio malzorgadon de la laboro pri la databanko. La laboro pli vere koncentriĝis sur la kreado de LEX-datenaro, kiun oni povis estri pli facile kiel Word-dokunentojn kaj kiuj vere estu la fina produkto de la labroro pri la Paradox-databanko. La LEX-datenaro, post sia transformado en PDF-datenaron, servis al la printado kaj la farado de pliaj lingvovolumoj. Helpe de tiu LEX-datenaro oni denove aktualigis la DEF- kaj TES-datenarojn. Tio fariĝis – kiel supre menciita – tre komplika. La nuna stato de la databanko estas tre obskura kaj – rilate la kvaliton – tre heterogena. La LEX-datenaro (Word-dokumentoj) supozeble estas la plej aktuala(j). Sed tiurilate ekzistas efektive ankaŭ multnombraj versioj.

Ĉi tiu situacio ne pli estas tolerebla! Tial la Asocia Estraro (Direkcia Konsilio) sin devontigis ellabori koncepton, kiu optimale kontribuus al la realigo de la celoj, 1981 starigitaj de niaj antaŭuloj. Ĉi tiun koncepton (vd. aldonaĵo 8) ni prezentis okaze de nia lasta membrokunveno. La koncepto baziĝas sur longedaŭra kaj peniga trarigardo kaj sekurigo de la dataoj kaj preciza analizo de merkate ekzistantaj solvoj. Ni estas konvinkitaj pri tio, ke WIKIPEDIA(Vikipedio)-simila solvo estas la plej bona alternativo por ni. Estas klare, ke de la koncepto ĝis ĝia realigo ankoraŭ estas farenda multe da laborado. Momente la necesaj financaj rimedoj por ni estas preskaŭ nevenkeblaj obstakloj. Estas multaj solvendaj problemoj. Ekzemple, kiel organizi estonte la terminologian laboradon sub tiuj novaj kondiĉoj? Estas evidente, ke rilate tion nepre estas formenda grupo da ekspertoj, ne havanta

[1] Internet-elektebla prezentado de informoj (IEPI), Internet-disponebla Datenaro (IDD)

antaŭjuĝon kontraŭ Internet kaj komputero-tekniko kaj krome loborus senpage, kiel niaj altestimataj kolegoj de la Terminologia Komisiono de IFRE. Por ĉiu de ni prilaborata lingvo oni formu laborteamojn kun direktanto, kiuj kontrolas kaj kunordigas la mondskalan kunlaboradon sur la futuraj paĝoj de nia Vikipedio-Lexicon-Silvestre-Portalo. Krome multnombraj demandoj de teknika maniero ankoraŭ estas nerespondataj. Pri ĉiuj tiuj problemoj ni sekvatempe multe okupiĝos, kaj ni esperas – kiel ĝis nun – vian aktivan subtenadon.

Kun tiu esperoplena perspektivo por la estonteco mi deziras al vi ĉiuj kontemplan Kristnaskon kaj ĉion plej bonan por la venonta jaro kaj restas

Via

Stefan Panka
nome de l`Asocia Estraro

# Bonan Novjaron !

## Protokolo
## pri la membrokunveno
## de Patrona Asocio “Lexicon silvestre”

je 2009-10-09 (vendredo),16.30 horo
en la domo de Forstbotanika Ĝardeno
16225 Eberswalde, Am Zainhammer 6

*Protokolantino: Clivia Panka*

**Tagordo:**

1. Malfermo kaj bonvenigo
2. Konstato pri la laŭregula invito, konstato pri la decidorajto
3. Interkonsiliĝo kaj voĉdonado pri la tagordo
4. Novaj gemembroj, eksiĝoj de gemembroj el la Asocio, aktuala nombro de la gemembroj
5. Raporto de l`Asocia Estraro (Direkcia Konsilio) – bilanca raporto (jar-raporto pri la pasinta laboro) (s-ro S. Panka)
6. Financa raporto (s-ro S. Panka)
7. Raporto de la kasrevizoro (s-ro d-ro B. Götz)
8. Aktualaj problemoj rilate la laboron pri “Lexicon silvestre”
9. Diskuto kaj voĉdonado pri la korektoj de l`Asocia Statuto
10. Diskuto kaj voĉdonado pri la korektoj de la Procedura Regularo de l`Asocio
11. Decido pri la akcepto aŭ malakcepto de ekzistantaj deklaroj pri membriĝo
12. Kromaj aferoj

Aldonaĵoj:
1. Bilanca raporto (jar-raporto)
2. Financa raporto
3. Raporto de la kasrevizoro, s-ro d-ro B. Götz
4. Nova statuto de l`Asocio “Lexicon silvestre” r.A.
5. Nova Procedura Regularo de l`Asocio (PRA)
6. Protokolo pri la ŝanĝo de l`Asocia Statuto
7. Protokolo pri la ŝanĝo de la Procedura Regularo de l`Asocio
8. Lexicon silvestre en nova aspekto – Wikipedia *(Vikipedio)*-projekto

ad 1: Bonvenigo fare de la prezidanto de l`Asocio, s-ro S. Panka

ad 2: s-ro S. Panka konstatis la ĝustatempan laŭordan inviton kun aldonaj dukumentoj. La prezidanto konstatis la ĉeeston de 8 gemembroj kaj sekve de tio la decidorajton.

**<u>Ĉeestis:</u>** D-ro Bernhard Götz, Ewa Młynarczyk-Luft, Johann Andreas Pachter, Clivia Panka, Stefan Panka, d-ro Johannes Schubert, d-ro Karl-Hermann Simon, d-ro Horst Weckwerth.
La nomoj de gemembroj, kiuj sin senkulpigis estis sciigataj. Kiel gastoj ĉeestis s-inoj Inge Simon kaj Jana Panka.

ad 3: S-ro Panka prezentis la tagordon kaj elpetis pliajn proponojn. Poste oni voĉdonis pri la tagordo.
Rezulto: 8 aproboj, do ĉiuvoĉa.

ad 4: Ekzistis du petoj pri membriĝo: s-ino Ewa Młynarczyk-Luft, s-ro Cyreen Knoeckert.
La deklaro pri eksiĝo de s-ro Weidner, sciigita al l`Asocia Estraro, nur povas fariĝi legitima post klarigo de ankoraŭ nerespondtogether demandoj.
Aktuala nombro de la membraro: 44

ad 5: Voĉlegado de la bilanca raporto (jar-raporto) fare de s-ro Panka (vd. aldonaĵo 1).
S-ro d-ro Weckwerth donis suplementan informon: la laborlokoj en la biblioteko de la Faka Altlernejo estas je la dispono ĝis 2009-12-15. S-ro d-ro Götz eksplikis : la malfacila afero rilate la laborlokojn ekestis pro la propra bezono de la Altlernejo

rezulte de ampleksa alikonstruado (en la biblioteko).

ad 6: Prezentado de la financa raporto (farita de S.Panka) per s-ro Panka (vd. aldonaĵo 2) S-ro d-ro Weckwerth petis informon pri la forsendo de la impostdeklaro 2008 al la impostoficejo. Li atentigis pri tio, ke oni povus atendi impostorepagon, kiu povus plibonigi la financan situacion de la Asocio. Responde al tio s-ro Panka informis, ke li jam rilate al ĉi tiu afero kontaktis kun s-ino Seeger kaj preparos kun ŝi la impostodeklaron. Sed unua superrigardo rezultigas nur bagatelan impostorepagon. Kaze de postulo de senprokrasta repago de senintereza monpruntaĵo – dum la pasintaj jaroj donita de gemembroj al la Asocio – tio ne protektus la Asocion kontraŭ nesolventeco.

ad 7: Raporto de la kasrevizoro, voĉlegita de s-ro d-ro Götz (vd. aldonoĵo 3) Responde al la demando de s-ro d-ro Weckwerth pri la kasrevizio de la financa jaro 2008, s-ro d-ro Götz voĉlegis ankaŭ ĉi tiun raporton kaj samtempe informis pri tio, ke la raporto por 2009 memkompreneble estus provizora, ĉar ĝi rilatus sole la tempon de januaro ĝis septembro 2009.

ad 8: Prelego de la prezidanto de l`Asocio, Stefan Panka, pri la Vikipedio-projekto "Lexicon silvestre en nova aspekto" (vd. aldonaĵo 8). Pri tiu temo okazis vigla diskuto. S-ro d-ro Weckwerth zorgoplene demandis, ĉu eblus enigi la ĝis nun ekzistantajn terminojn en la Viki-projekton. S-ro Panka klarigis: estas teknike senprobleme enigi tiujn terminojn en la projekton pro la unueca strukturo de la ĝis nun ekzistantaj artikoloj. La malnova databanko estus valora bazo por la projekto.
S-ino Simon timis: la restrikto je la Internet povus ekskluzivi multajn eventualajn uzantojn, ĉefe en la evolulandoj. Sed oni konstatis, ke eblas kontakti per Internet verŝajne kun pli da homoj ol libroforme kiel ĝis nun okazis.
S-ro d-ro Schubert informis sin pri la ebloj protekti la projekton kontraŭ misuzo. Pri tio klarigis s-ro Panka: la faritaj ŝanĝoj fare de la vizitantoj de la Viki-platformo estu unue fiksataj en la tiel nomata versioafero kaj poste kontrolataj de rajtigitaj fakaj ekspertoj. Nur post konstato de sencoplenaj ŝanĝoj aŭ novaj proponoj ĉi tiuj estos aprobataj.
S-ro d-ro Weckwerth starigis la demandon pri la financrilata aprobo de la Viki-projekto. S-ino E. M-Luft pri tio opinis: konvinka, uzantoplaĉa prezentado de Lexicon silvestre en Internet certe ankaŭ kaŭzos pli grandan pretecon por mon-donacoj respektive aĉeton de unuopaj volumoj, des pli multe ĉar oni jam nun povas facile realigi la bezonon de volumoj po du deziritaj lingvoj.
S-ro d-ro Schubert proponis utiligi EU-subtenaj monoj por la projekto. Replikante s-ino Simon atentigis pri la subtenantaj Esperanto-projektoj de d-ro Blanke kaj proponis utiligi ĉi tiujn spertojn same kiel ankaŭ tiujn de la ĉeĥoj, jugoslavoj kaj poloj. S-ro Panka scigis la geĉeestantojn, ke ĉirilataj klopodoj jam estas iniciatitaj.

ad 9: La faritaj ŝanĝoj de l`Asocia Statuto estas dokumentitaj en la protokolo pri la ŝanĝo de la statuto. La geĉeestantoj ricevis la faritajn ŝanĝojn de la statuto per la laŭorda invito por la hodiaŭa membrokunveno. La voĉdonado pri la nova statuto: ĉiuvoĉa akcepto de la ŝanĝo

ad 10: La faritajn ŝanĝojn de la Procedura Regularo de l`Asocio (PRA) entenas la protokolo pri la ŝanĝo de la PRA. La sola informpeto de s-ro d-ro Weckerth koncernis § 5.3 de la PRA. S-ro Pachter kaj s-ro d-ro Götz konfirmis la kutimon kaj ĝustecon de tia klaŭzo. Ĝi ebligas al la Asocio doni kvitancojn pri mon-donacoj. Poste okazis la voĉdono pri la akcepto de la nova PRA. Rezulto: unuvoĉa akcepto de la faritaj ŝanĝoj.

ad 11: Post konciza prezentado de ambaŭ novaj asociaj membroj, s-ino Ewa Młynarczyk-Luft kaj s-ro Cyreen Knockeart, ties membriĝo estis ĉiuvoĉe aprobita.

ad 12: La prezidanto, s-ro Stefan Panka, dankis al ĉiuj geĉeestantoj pro ilia partopreno en la kunveno. Aparta danko estis ŝuldata al s-ro d-ro Schubert, kiu abrupte donis kontribuon por la prelegaranĝo, okazinta antaŭ la membrokunveno. Ĉirkaŭ 18.30 horo s-ro Panka finis la membrokunvenon.

Protokolantino — Prezidanto de la Patrona Asocio

Clivia Panka — Stefan Panka

Eberswalde 2009-10-09

## Aldonaĵo 1

### Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.

**Bilanca raporto** (Jar-raporto) **2009**
Stefan Panka

Dum la lasta ĉefa kunveno je 2008-10-17 estis balotata nova Asocia Estraro (Direkcia Koncilio). Ĝi konsistas el 3 membroj:

Stefan Panka (prezidanto)
Lubomir Blaško (vicprezidanto)
Peter Spangenberg (trezoristo) kaj
Karl-Hermann Simon kiel honora membro de la estraro

La ŝanĝo ene de la estraro estas notarie dokumentita, la ŝanĝoj ankaŭ estas sciigitaj al la ŝparbanko. La subskriboj estas konataj al la ŝparbanko.

Je la 17a de oktobro 2008 estis decidataj nova statuto kaj la Procedura Regularo de la Patrona Asocio (PRA). Post la atentigoj pri farendaj korekturoj fare de la administranto de juro ĉe la loka tribunalo en Frankfurt ni reprenis ambaŭ dokumentojn for de la registrado ĉe la tribunalo. La necesaj ŝanĝoj okazu hodiaŭ fare de voĉdonado de la ĉeestantaj gemembroj (vd. aldonaĵoj 4 kaj 5 (8 kaj 9)).

La estraro ĝis nun kunsidis sepfoje (10.11.08, 21.11.08, 14.02.09, 07.07.09, 28.07.09, 14.08.09, 04.10.09).

La sekvajn aktivitecojn oni povas registri:

- Trarigardo kaj sekurigo de la dataoj
- Malmendo de ISDN por niaj presitaĵoj
- Ellaborado de indiko pri jura protekto por niaj lingvovolumoj
- Publikigo de niaj lingvovolumoj en Internet. En kazo de bezono/demando/mendo la farado de presitaj libroj eblas. Tio okazas per PS-eldonejo.
- Realigo de la propono de Jürgen Peters rilate al alvoko pri mon-donacoj sur niaj Internet-paĝoj
- Skizo de nova koncepto rilate la pluan prilaboradon de la LS (Viki-projekto), rezigno pri la malnova Paradox-databanko
- Translokiĝo de nia centralo en la ejojn de la biblioteko de la Faka Altlernejo
- Aranĝo de artiklo pri LS en Vikipedio

- Diĝitigo, arkivigo kaj ekkonigo de ĝis nun de ni eldonitaj buletenoj “Forstista Informilo” en Internet (finiĝo ĉ. fine de 2009)
- La trilingva (ESPERANTO, GERMANA, ANGLA) apero de nia Homepage estas konsekvence realigata
- Proksimume fine de 2009 finiĝo de la ellaborado de la 9a parto (volumo) en Esperanto
- MAE-aranĝo: ni daŭrigos la MAE-aranĝon ĝis fine de 2009. Estis okupitaj la per la laboroficejo asignitaj personoj s-ino Trapp-Koyuncu, s-ro Ehlert kaj s-ro Stoffel kun mallonga interrompo. Ili laboras pri diĝitigo de antaŭaj korespondaĵoj/publikaĵoj kaj dataoenigado. La Faka Altlernejo disponigas senkoste la laborĉambron. Krome la Altlernejo permesas la senkostan uzadon de Internet. La gepartoprenantoj de la aranĝo ricevas de la Job-Center 1,10 Eŭro po horo por kompensaĵo pri elspezoj. La Patrona Asocio ricevas 60,- Eŭro po monato por la prizorgado de la aranĝo.

## Financoj:

La financaj aferoj unue prizorgis d-ro Weckwerth. Ekde je la 10a de februaro 2009 s-ro Spangenberg transprenis tiun oficon. La de ni ĉe la ŝparbanko Barnim uzata ĝirokonto estos ŝanĝita je Online-praktiko. Ekde je la 20a de septembro 2009 s-ro Blaško kiel komisiito transprenis la taskojn de trezoristo, ĉar s-ro Spangenberg pro personaj kaŭzoj ne plu estis al dispono. La jarfina bilanco tamen okazis ĝis la limtago kaj la dokumentoj estis transdonitaj al la kasrevizoro, s-ro d-ro Götz, pro kontrolo. La permana kaso, ĉefe destinita por sekurigo de senperturba agado de la MAE-laboruloj, estas administrata de s-ro d-ro Weckwerth.

Stefan Panka

Eberswalde, 2009-10-09

# Kasraporto 2009 de la Patrona Asocio "Lexicon silvestre r.A.
(Stato 2009-09-30)

### Ĝenerala financa resumo

| Pozicio | Eŭro |
|---|---|
| Saldo(01.01.2009)…..+ | 525,28 |
| Enspezoj…………….. + | 2.875,36 |
| Elspezoj………………. – | 3.059,42 |
| Saldo (31.12.2009)…. + | 321,22 |

### Enspezoj detale

| Pozicio | Eŭro |
|---|---|
| Membrokotizoj………… . | 225,00 |
| Mondonacoj……………. | 150,00 |
| Transpago laborof…… | 2.499,56 |
| Sumo:…………………… | 2.875,38 |

### Elspezoj detale

| Pozicio | Eŭro |
|---|---|
| Poŝtkostoj/poŝtm…………………… | 5,50 |
| Kontokotizoj………………………… | 32,91 |
| Pago MAE-laboruloj…………… | 2.310,00 |
| Buromaterialo……………………… | 52,61 |
| Libroj (donacoj al MAE)…………… | 26,00 |
| Kotizoj por notaro………………….. | 33,86 |
| Komputero-muso…………………… | 6,99 |
| Presado+ bindado 5 LS-libroj…….. | 63,85 |
| 2 USB-sticks (hardvaro)…………… | 29,99 |
| Farbo (Toner) por presilo………….. | 36,94 |
| Dur-disko eksterkomputera 160GB……………………………….. | 60,87 |
| Repago monpruntaĵo d-ro Weckerth……………………….. | 400,00 |
| Sumo:…………………………….. | 3.059,42 |

### La bonhavaîo (saldo) konsistas el

| Pozicio | Eŭro |
|---|---|
| En konto......................... | + 303,54 |
| En permana kaso............ | + 17,68 |
| Sumo:............................. | + 321,22 |

### Mondonacoj por la Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.

| Nomo | Eŭro |
|---|---|
| S-ino Blanke (30.01.09)……….. | 60,00 |
| S-ro Blaško (07.01.09)…………. | 5,00 |
| D-ro Dannroth (03.09.09)………….. | 15.00 |
| S-ino Panka (09.08.09)……………. | 30,80 |
| Prof. Quednau (03.02.09)…………. | 5,00 |
| S-ro I.Ullrich (04.09.09)……………. | 35,00 |
| Sumo:……………………………….. | 150.80 |

### Membrokotizoj 2009

| Nomo | Eŭro |
|---|---|
| 1. S-ino Blanke……………………… | 15.00 |
| 2. S-ro Blaško……………………….. | 15.00 |
| 3. D-ro Dannroth…………………… | 15.00 |
| 4. D-ro Götz………………………… | 15.00 |
| 5. S-ino Jähnig-Westendorf (29.12.08) | 15.00 |
| 6. S-ro Knoeckert…………………… | 15.00 |
| 7. S-ino Meier……………………….. | 15.00 |
| 8. S-ino Młynarczyk-Luft…………… | 15.00 |
| 9. S-ino Panka……………………… | 15.00 |
| 10.S-ro Panka……………………… | 15.00 |
| 11.S-ro Peters……………………… | 15.00 |
| 12.Prof. Quednau…………………… | 15.00 |
| 13.S-ino Reimann………………….. | 15.00 |
| 14.D-ro Simon……………………… | 15.00 |
| 15.S-ro Ullrich……………………… | 15.00 |
| 16.D-ro Weckwerth………………… | 15.00 |
| Sumo:……………………………… | 225.00 |

Listigo fare de S. Panka je 2009-10-05

Kontrolita de d-ro B. Götz je 2009-10-07

## Aldonĵo 3

Lexicon silvestre r.A.
Kasrevizoro
D-ro Bernhard Götz
Eichwerderstraße 42
D-16225 Eberswalde

**Kasrevizio (fiksita limdato 30.09.2009)**
**Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.**

La dokumentojn (kasraporto 2009, kaslibro 2009, listigo de la kasotenado 2009, kontoeltiraĵoj 2009, superrigardo de la ĝiroeltiraĵoj kaj atestiloj 2009), transdonitajn de s-ro Stefan Panka, mi detale kaj zorgeme reviziis kaj kontrolis sample la bilancojn. La librotenado estas korekta. Ĝi entenas la enspezojn kaj elspezojn de la Asocio. La respektivaj atestiloj estas sisteme aldonitaj kaj numeritaj. Ekzistas sencoplena superrigardo (kasraporto). La listigo estas komprenebla. Ambaŭ kasoj (ŝparkaso, permana kaso) estas elmontritaj. La de mi faritaj kontrolkalkuloj rezultigis la samajn sumojn.

Tio konfirmas korektan kasotenadon.

D-ro Bernhard Götz
kasrevizoro

Eberswalde, 2009-10-07

## Aldonaĵo 4

el la germana esperantigis: Fritz Gädicke, Britz

### Statuto de la publikutila Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ r. s.

1. La nomo kaj la loko de la asocio

1.1. La asocio havas la nomon "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r. s." (Förderverein 'Lexicon silvestre' e. V.").

1.2. La asocio havas sian lokon en Eberswalde. Ĝi estas enskribita en la societan registron.

2. La celo de la asocio

2.1. La celo de la asocio estas doni subtenon al la ellaborado de "Lexicon silvestre". Ĉi tiu verko estas datumbanko de la terminologio forstfaka. La verko estiĝas sur internacia bazo en kunlaborado de forstistoj kun diversaj fakuloj. La egalrajteco de ĉiuj lingvoj estas la bazo neforigebla el tiu ĉi komuna projekto.

2.2. Ĉirilate la asocio subtenas ĉiujn paŝojn direktitajn al internacia kunlaborado.

2.3. La asocio agas altruisme, ne intencante realigi profitaĵojn.

2.4. La monrimedoj de la asocio estu uzataj nur por celoj laŭstatutaj. Membroj de la asocio ne ricevu gratifikaciojn el la fonduso de la asocio.

2.5. Neniu persono estu privilegiata per troa kompensado aŭ per elpezoj kontraŭaj al la celo de la asocio.

3. La agado de la asocio

La asocia agado reguliĝas per la regularo surbaze de ĉi tiu statuto. La regularo validas kompletige al la statuto kaj al individuaj kotraktaj regulaĝoj. La regularo estu akceptita de la membrokunveno.

4. La membreco

4.1. Naturaj personoj, kiuj aprobas la statuton, povas fariĝi membroj de la asocio. Rajto esti akceptita ne ekzistas.

4.2.1. La membreco komenciĝas tiam kiam la estraro aprobis la aliĝdeklaron.

4.3. La membreco finiĝas ĉe eksiĝo aŭ morto de la membro aŭ fare de ties esigo deklarita de la estraro. La koncernaj membroj rajtas kontraúdiri la eksigon (forme de kroma almendo) antaú la membrokunveno, kiu decidas la aferon finfare.

4.4. Membroj ĉeestantaj la kunvenon havas po unu voĉo kaj povas fari proponojn. Tiamaniere ili rajtas kaj uzas la eblecon aktive influi la evoluon da la socio kaj ĝiajn celojn.

4.5. Personoj meritplenaj pro la asocio povas esti nomitaj de la membrokunveno kiel honoraj membroj. Ili havas la samajn rajtojn kiel la ordinaraj membroj – escepte de la kotiza ordo.

5. La monrimedoj

5.1. La monrimedoj de la asocio rezultas el membrokotizoj kaj mondonacoj.

5.2. La alteco kaj la pagdato de la kotizoj reguliĝas per la regularo.

6. La organoj de la asocio

6.1. Organoj de la asocio estas - la membrokunveno - la estraro

6.2. Por progresigi la asocian laboron la estraro rajtas instali fakajn komisionojn.

7. La membrokunveno

7.1. Laúprincipe la estrarestro aú destinata de li anstataúanto prezidas la membrokunvenon.

7.2. Proponoj al la membrokunveno

Proponoj estu prezentitaj antaú ol la tagordo etas fiksita.

7.3. La membrokunveno decidas la finvalidan tagordon.

7.4. Pri ĉiu membrokunveno kaj ĉiu estrarkunsido protokoloj pri decidoj estu skribitaj kaj akceptitaj de la respektiva kunvenintaro per simpla plimulto. La protokoloj estu skribitaj de protokolinto kaj subskribitaj kaj per li kaj per unu estrarano.

7.5. Al la taskoj de la membrokunveno apartenas antaŭrange

- la elekto kaj la malelekto de la estraro
- la elekto de la kasrevizoro
- la akcepto de la jarraporto de la estraro
- la senŝarĝigo de la estraro
- la decido pri eventuala ŝanĝo de la regularo
- la decido pri statutŝanĝo
- la decido pri la malfondo de la asocio

7.6. La membrokunveno estas invitenda,

- kiam la intereso de la asocio necesigas tion, sed almenaŭ unu fojon dum la kalendara jaro,
- kiam 20 % minimume da la membraro postulas tion per skribaj proponoj. Ĉikaze la estraro kunvoku la membrokunvenon en la daŭro de 14 tagoj kaj fiksu ties daton ne pli malfrue ol 6 semajnoj post la efika postulo.

7.7. La estraro kunvoku la membrokunvenon skribe, observante la minimuman de 4 semajno kaj deklarante la tagordon. La 4 semajnoj komenciĝas la tagon sekvontan la forsendon de la invitskribaĵoj. Komunikaĵoj de la asocio al la membroj estas rigarditaj kiel ricevitaj, se ili estis forsenditaj sub la lasttempa adreso sciigita al la estraro.

7.8. Ĉiu membrokunveno, kunvokita laŭstatute, estas decidpova.

7.9. La partoprenantoj voĉdonas levitante la manojn. En voĉdono la simpla plimulto estas decida. La malelekto de la estraro, la ŝanĝo de la statuto kaj la malfondo de la asocio estu deciditaj per dvatriona plimulto de la validaj voĉoj. La membrokunveno nomumas balotgvidanton, kiu realigas la elekton de la estraro.

8. La estraro

8.1. La estraro konsistas el 3 personoj (estro, vicestro, trezoristo). Minimume du estraranoj rajtas agi kune in la nomo de la estraro.

8.2. La membrokunveno elektas la estraron por kvar jaroj.

8.3. Dum sia mandato la estraro povas esti malelektita nur, se alia estraro estas elektita samtempe.

8.4. Se membro eksestrariĝas antaŭtempe, la malkompletiĝinta estraro aligas estraranon anstataŭan. La aligo estas aprobenda de la sekvonta membrokunveno.

8.5. Kiam ies asocia membreco finiĝas, tiam ties estraraneco ankaŭ finiĝas.

9. La raporto

9.1. La estraro prezentu por la estinta financa jaro la raporton pri la activeco de la asocio kaj pri ties financoj ĝis la 31-a de Marto.

9.2. Revizoroj, nomitaj de la membrokunvenaro, faras la revizion de la jarfina bilanco.

10. La malfondo de la asocio

10.1. Per deklaro de la membrokunveno la asocio fariĝas likvidinda.

10.2. Ĉe malfondo de la asocio aŭ ĉe ĉeso de la impostfavoraj celoj la posedaĵo de la asocio iras al “Eberswalder Förderverein für Lehre und Forschung e. V.”, kiu uzu ĝin por publikutilaj, bonfaraj aŭ ekliziaj celoj.

10.3. Se la membrokunvenaro ne decidas ion alian, la estraro funkcias kiel likvidanto.

La statuto estis akceptita sur la membrokunveno la 9-n de Oktobro en 2009.

Eberswalde, 09/10/2009

## <u>Aldonaĵo 5</u>

el la germana esperantigis: Fritz Gädicke, Britz

# Procedura Regularo de la Patrona Asocio de publika utilo “Lexicon silvestre” r.A.

**§ 1 Ĝeneralaĵo**

La regularo reguligas la aktivecon de la asocio surbaze de la statuto. Ĝi validas kompletige al la statuto kaj al individuaj kontraktaj regulaĵoj. La regularo estu akceptita de la membrokunvenaro.

**§ 2 Aferdirektado**

La aferoj de la asocio estas direktataj de la estraro enkadre de lia kompetenteco kaj en la nomo de la membrokunvenaro.

**§ 3 La taskoj de la estraro**

(1) La estraro gvidas la laboron de la asocio inter la membrokunvenoj. La estraro estas prirresponda al la membra kunvenintaro. Al ĝiaj taskoj precipe apartenas:
- la koncepta planado kaj la evoluigo de la asocia laboro
- la publikigado
- la prizorgado por la membroj

(2) La statuto reguligas la apartenadon al la estraro.
(3) Ĉiuj juraferoj kaj elspezoj devas esti pravigitaj per laŭregula estrara decido. En estrara voĉdono la simpla plimulto estas decida.
(4) Korespondaĵoj, koncernantaj asociajn aferojn, estu distribuataj al ĉiuj estraranoj. Tio speciale koncernas korespondaĵojn elprenitajn el la asocia postfako.
(5) La estro reprezentas la societon publike. Li invitas al la kunsidoj, sciigante pri la tagordo, kaj estras la kunvenojn de la estraro.
(6) Bezonokaze la vicestro plenumas la estrajn devojn.
(7) La trezoristo tenas la kaslibron kaj administras la asocian konton kaj la membrokotizojn. Li regulare raportas al la estraro la elspezojn kaj la enspezojn.

**§ 4 La membrokotiza ordo**

(1) La membrokotizoj estas pagendaj antaŭ la 31-a de Januaro de la respektiva jaro.
(2) Akceptita membro tuj pagas sian kotizon por la kuranta jaro.
(3) La honora membreco, atribuita de la membrokunveno, estas senkotiza.
(4) La membrokunveno destinas la altecon de la kotizo. La aktuala jarkotizo estas 15 euroj. Mondonoj estas akceptotaj.
(5) Membroj, prokrastintaj la kotizpagon du jarojn, estas eliminotaj el la membra listo. La nuligo de membreco estu sciigita al ili scribforme.

**§ 5 Elspezoj kaj vojaĝkostoj**

(1) Elspezoj
Elspezoj, estiĝintaj al membro en la intereso de la asocio, estas kompensataj, se la estraro aprobis ilin. En unikaj kazoj posta konsento estas ebla.

(2) Vojaĝkostoj
Vojaĝkostoj, estiĝintaj al membro en la intereso de la asocio kaj pro subtenado de la asociaj celoj, estas kompensataj laŭ unika provo kaj en alteco de la imposte makcimale permeseblaj sumoj ĉioninklusivaj, sub la kondiĉo, ke la estraro permesis la vojaĝon. En unikaj kazoj posta konsento estas ebla. Por difinaj, repetiĝaj vojaĝoj la estraro rajtas deklari ĝeneralan permeson.

(3) Kompenso por membroj por elspezoj
Laŭ decido de la estraro la asocio povas pagi al membroj kompenson por elspezoj laborkaŭzaj.

**§ 6 Estrarkunsidoj**


(1) Tagordo estu preparita por ĉiu estrarkonsido.
(2) La anoj de la estraro decidas finvalidan tagordon.
(3) Al ĉiu estrarkunsido estu skribita protokolo pri la decidoj.


Tiu ĉi regularo estis akceptita sur la membrokunveno la 9-n de Oktobro en 2009.


Eberswalde, 09/10/2009

## Aldonaĵo 8



LEXICON SILVESTRE
Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto
Superrigardo
1. Antaŭhistorio
2. La Databanko
3. Uzantosurfaco
4. Konkludo
09-10-2009
Stefan Panka
1


LEXICON SILVESTRE
Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto
Antaŭhistorio
La komenco
1981
Internacia grupo da forstfakuloj, anoj de Internacia Forstista Rondo Esperantligva (IFRE)
1985 Membroj de Ĉambro de Tekniko de iama IFE
Dr. K.-H. Simon
Consiliarii rei silvae
Terminologia Komisiono
Socii operis linguae
09-10-2009
Stefan Panka
2


LEXICON SILVESTRE
Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto
Antaŭhistorio
Celo
Forstfaka vortaro
Nocio
[Difnio]
Leksikono
09-10-2009
Stefan Panka
3



LEXICON SILVESTRE
Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto
Antaŭhistorio
1991-1993
Paradox-DB
(S-ro Weidner)
DEF01_EO.DB
DEF02_EO.DB
DEF03_EO.DB
DEF04_EO.DB
DEF05_EO.DB
DEF06_EO.DB
DEF07_EO.DB
DEF08_EO.DB
DEF09_EO.DB
DEF10_EO.DB
DEF08_DE.DB
DEF09_DE.DB
DEF10_DE.DB
TES01_EO.DB
TES02_EO.DB
TES03_EO.DB
TES04_EO.DB
TES05_EO.DB
TES06_EO.DB
TES07_EO.DB
TES08_EO.DB
TES09_EO.DB
TES10_EO.DB
TES08_DE.DB
TES09_DE.DB
TES10_DE.DB
EDCE.DB
09-10-2009
Stefan Panka
4


LEXICON SILVESTRE
Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto
Antaŭhistorio
La strukturo Txt- dataoj
FDCE-numero
Labornombro
114.12.02.20
0013
Lingva
de: Hangwasser n
Nocio
[Bodenwasser, das sich Hang abwärts bewegt]
Difinio
09-10-2009
Stefan Panka
5


LEXICON SILVESTRE
Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto
La databanko
SQL-DB
LS.DB
ID
NR
LINGUA
BEGRIFF
DEF
VERSIO.DB
ID
NR
LINGUA
BEGRIFF
DEF
DATUM
AUTOR.DB
ID
NR
NAME
IP-ADRESSE
FDCE.DB
ID
NR
FDCE
09-10-2009
Stefan Panka
6

## Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto


Uzantosurfaco




09-10-2009 Stefan Panka 7

## Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto

Uzantosurfaco





09-10-2009 Stefan Panka 8

LEXICON SILVESTRE

## Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto

**Uzantosurfaco**





09-10-2009 Stefan Panka 9

LEXICON SILVESTRE

## Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto


**Uzantosurfaco**




09-10-2009 Stefan Panka 10

## Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto

**Uzantosurfaco**




09-10-2009 Stefan Panka 11

## Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-projekto

**Konkludo**

- Databanko-Antaŭkonoj ĉe la databankoflego ne necesas
- La problemo pri la kodigo de specialaj signoj ne necesas pro la apliko de UTF-8
- Mondskala kunlaboro pri la sama projekto eblas per hejmlaboro
- Uzantoplaĉa surfaco

09-10-2009 Stefan Panka 12

## PRES-INDIKAĴOJ

| **Kontaktadreso:** | **Eldonisto/Redaktoro:** |
|---|---|
| Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ e.V.<br>Faka Altlernejo Eberswalde<br>D-ro Bernhard Götz<br>Am Zainhammer 5<br>D-16225 Eberswalde<br>Tel.: +49-3334-65 563   Fax: +49-3334-65 567<br>Email: kontakt@lexicon-silvestre.de<br>Homepage: www.lexicon-silvestre.de | Stefan Panka<br>Joachimsthaler Str. 15a<br>D-16230 Britz<br>Tel.: +49-3334-255 228<br>Email: s.panka@lexicon-silvestre.de |